

Wilhelm Busch,  
Maks kaj Moĉjo, Antaŭparolo

*tradukita de Pejno Simono*

Ho, ni ofte aŭdas, iam legas,  
ke infanoj malbonegas.  
Jen ekzemplo el la vico -  
nome Makso kaj Morico.  
Neniam estis pliboniĝo  
malgraŭ saĝa admoniĝo.  
Ofte ili tion ridis  
kaj sekrete eĉ ĝojiĝis.  
Jesante malbonagon, ili  
ĉiam pretis tiel brili.  
- Torturi bestojn, tedi homojn,  
ŝteli pirojn, prunojn, pomojn -  
vere plaĉis tiom forte.  
Krome estis pli komforte,  
ol en kirko aŭ lernejo  
malmoviĝi sur sidejo.  
Sed ve, ho ve! - Kiam tamen  
mi rigardas al la amen.  
Ah, tiu estis grava kaĉo,  
kiel fartis Moĉj' kaj Maĉjo.  
- Tial ili jen pentrotaj  
kaj la agoj priskribotaj.

*Traduko de la Germana poemo "Max und Moritz, Vorwort" de WILHELM BUSCH (\*1832-04-15 - †1908-01-09) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).*

*Arg-973-1968 (2014-03-14 10:14:06)*